

## el recenzo de Christian DECLERCK

Sen ombro da dubo, Edwin DE KOCK estas unu el niaj plej gravaj poetoj kaj lia lasta libro – *Sub Fremdaj Ĉieloj* – estas nepre leginda. [...]

Cetere, prozo: ĉilibre du trionoj. Interesa: la aŭtoro superrigardas sian karieron. Poste esprimas sin homoj kiuj multe rilatis kun li persone. La tekston de la unua, kiu verkis ankaŭ antaŭparolon, li mem tradukis el la angla, en sia majesta Esperanto kiu forte distingiĝas disde la lingvaĵo de la tri aliaj samideanoj.

Sur la malantaŭo de la kovrilo rigardas el eta foto la 77-jarulo. Memoras mi la belan grandan foton en *Saluton al la suno*, lia plej optimisma poemaro. Por komparo... mi elŝrankigis la unuan numeron de *gepatra bul-teno* (januaro-marto 1967), tiama kvaronjara eldonaĵo (de Derrick P. FAŭ, Anglujo) “por gepatroj kiuj uzas Esperanton en la familia vivo”. Ĝi entenas artikolon de Edwin de Kock pri *Denaska Esperantismo* kaj kovrile portas foton de li kun la edzino (Ria) kaj la unua filo (André). Pri ili, ankaŭ en la recenzataĵo, li ja ne finas paroli, ĉu proze aŭ poezie: eĉ ...



Edwin de Kock, filo André, edzino Ria. 1966 (?).

### Edwin DE KOCK *Sub fremdaj ĉieloj*

poemoj kaj eseoj  
FEL, Antverpeno, Belgio, 2007, 286 paĝoj

## el recenzo de Catherine ROUX

Tiu malgranda libro, *Ĉina galerio – 108 Rondeloj de Guozhu*, enhavas 108 rondel-etojn, omaĝe al diversaj esperantistoj, ĉu homoj, ĉu revuoj, el Ĉinio aŭ el aliaj landoj: Armand Su, Cicio Mar, Laŭlum, Mao Zifu, Peng Zhengming, Verda Majo, Kurisu Kei, Rejna de Jong k.a. ...

### *Ĉina galerio*

### *108 Rondeloj de Guozhu*

Hubei E-Asocio, Ĉinio, 2008, 110 p., Havebla ĉe LG.

